n-ro 57

julio 1997

## Universala Kongreso Adelajdo

Nur kelkaj IKEF-membroj anoncis sian ĉeeston en la UK. Salono por IKEF-informkunveno estas rezervita; kongresanoj trovos en sia kongreslibro daton kaj ejon de la kunveno.

Ĉar d-ro Polerani, komitatano por IKEF, ne partoprenos la UK, anstataŭos lin s-ro Walter VAN DEN KIEBOOM (IKEF 78) el Belgio (fakso +32 59 80.23.42).

## Enhavo

Anoncitaj aranĝoj . . . . . 3
Internacia Jura Revuo . . . . . 3
Alvoko al sindikatanoj - IKEF-hejmpaĝo . . . . . 3
Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart . . . . . 4
Elekto de la estraro . . . . . 5
Sindikata Terminaro: reeldon(et)o . . . . . 5
Alvoko por kunlaboro en la redaktado de La Merkato . . . . . 6
Internacia TradukReto (ITRE): nova adresaro . . . . . 6
Novaj membroj - novaj adresoj . . . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj . . . . . 7
Identecŝildo BIMONT . . . . . 7
Tradukprojekto por IKEF ? . . . . . 8

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

Atentu !

Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD). Kiu aliĝas meze de la jaro, pagu por 18 monatoj (900 aŭ 600 BEF).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per **eŭroĉeko** (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendota al Roland ROTSAERT, kaj per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj).

**Perantoj**:

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an

*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy)



*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**Anoncitaj aranĝoj**

**Wuhan, Ĉinio**, 12-13 julio 1997: Seminario de Donghu Esperanta Domo (DED). Informoj (ankaŭ pri aliaj realigoj de DED, ekz. la gazeto Penseo): Peng Zhengming, Meiyuan xiaoqu 301-3-2, CN-430070 FUJIAPO, WUCHANG, WUHAN, tel. 0086-27-7818012, fakso 0086-27-7481071, reto dedhea(a)public.wh.hb.cn.

**Jekaterinburg, Rusio**, 9-17 aŭgusto 1997: Eŭropo-Azio 1997. Organizas Urala E-Societo sub aŭspicioj de Monda Turismo, REU kaj Ruslanda Esperantisto. Ejo: Ŝtata profesia-pedagogia universitato. Temo: Esperanto post la jaro 2000. Informoj: pk. 67, RU-620077 JEKATERINBURG; rete: hrgo(a)sbank.e-burg.su.

**Yusong Junulara Gastejo, Koreio**, 15-17 aŭgusto 1997: 16a Komuna Seminario de Esperanto inter Korea, Ĉina kaj Japana Junularoj. Temo: Esperanto en la 21a jarcento. Organizanto: Korea Esperanto-Junularo, CPO Kesto 7998, Seulo, Koreio; fakso +82-2-741-1291, reto keast(a)soback.kornet.nm.kr. Kotizo: 10 000 enoj (por japanoj), 50 usonaj dolaroj por aliaj; enhavas loĝadon kaj manĝadon, ne asekuron. Haveblas subteno (vojaĝkostoj) por kelkaj aziaj prelegontoj.

**Kyongju, Koreio**, 25-26 oktobro 1997: 29-a Korea Kongreso de Esperanto. Informoj: Korea Esperanto-Asocio, C.P.O. Kesto 4258, SEULO 100-642, reto keast(a)soback.nm.kr, http://aistar.kotel.co.kr/~espero/kea.

**Internacia Jura Revuo**

Norvega Esperantista Ligo ankoraŭ disponas pri stoko de la numeroj 11 ĝis 36 de Internacia Jura Revuo. Eblas mendi ilin kontraŭ pago de la sendokostoj ĉe s-ro Douglas Draper, 'Esperanto', Olaf Schous Vei 18, N-0572 OSLO; telefono kaj fakso +47-22-35 08 94, reto esp.oslo(a)sn.no.

André RUYSSCHAERT, sekretario de Esperanta Jura Asocio

**Alvoko al sindikatanoj**

Georges SOSSOIS (Belgio, IKEF 101) sukcesis instrui Esperanton al kelkdekaj belgaj (franclingvaj) sindikatanoj. Por pruvi la utilon de la lingvo kaj por spertiĝi ili nun bezonas kontaktojn kun alilandaj sindikatanoj. Interesitoj bonvolu anonci sin ĉe Georges SOSSOIS aŭ Roland ROTSAERT. Utilas mencii specialaĵon, funkcion, ktp. Ankaŭ personoj el landoj kie sindikatoj nur en embria formo ekzistas, estas bonvenaj. Belgaj sindikatoj havas tradicion de asisto en formo de trejnado kaj praktika helpo.

RR

**IKEF-hejmpaĝo en Interreto** (prizorganto: <service(a)teamholm.dk>)

Iomete ŝanĝiĝis la URL (nun 'teamholm' estas tute en minuskloj): http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/ikef.htm

Ĉar iuj personoj daŭre havas problemon por atingi la IKEF-paĝon, oni eble ankaŭ provu trovi ĝin pere de la ĉefa paĝo de la prizorganto: http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/espero.htm

RR

**IKEF ĉe la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Stuttgart**

Pli ol 350 Esperanto-parolantoj el 20 landoj kunvenis dum Pentekosto en la baden-virtemberga ĉefurbo Stuttgart, lulilo de la aŭtomobilo, al la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso kun la ĉeftemo "Eŭropo-kien vi ?" Kvartaga programo atendis ilin, inter tio prelegoj kaj podia diskuto pri la estonta evoluo de EU, jarĉefkunvenoj de GEA en UFE, kunsidoj de fakaj asocioj, diskutrondoj, teatra prezentaĵo de la germana grupo "Kia Koincido" ("La kalva kantistino" de Eugen Ionescu), ekumena diservo kaj diversaj ekskursoj.

IKEF estis diversforme enplektita en la programo. Sabate posttagmeze prelegis niaj membroj d-ro Michael Cwik, Bruselo (IKEF 50) kaj d-ro Werner Bormann, Hamburgo (IKEF 27). Dum la podia diskuto dimanĉe matene sidis ĉe la tablo i.a. nia membro d-ro Rainer Kurz, Stuttgart (IKEF 235). Ne lastrange okazis IKEF-informkunveno sub la gvido de prezidanto Franz Josef Braun (IKEF 4).

Michael Cwik, ekonomiisto de la EU, prelegis pri la nun multe diskutata valuto-unio, kiuj alportos ekde la jaro 1999 la novan monon eŭron. En liaj argumentoj por kaj kontraŭ la eŭro nete superpezis la poraj avantaĝoj.

Pri la lingva problemo de EU referis Werner Bormann, prezidanto de la Akademio de Esperanto. Tiu problemo kreskegos per ĉiu nova membroŝtato (ĉefe el mez-orienta Eŭropo) staranta antaŭ la pordo de EU. Tial la EU-instancoj certe iun tagon devos decidi pri komuna lingvo.

Tiu lingvoproblemo same ĉefrolis en la podia diskuto je la pentekosta dimanĉo sub la demando "Eŭropo - kien ?". Partoprenis sur la podio s-ro Marko Naoki Lins por la germana junularo, s-ro Zlatko Tiŝljar el Kroatio, s-ro André Ruysschaert el Luksemburgo kiel diskutgvidanto, s-ro Siegbert Alber, ano de la Eŭropa Parlamento el Stuttgart, kaj d-ro Rainer Kurz, kiu aparte pritraktis la starpunkton de la ekonomio. "La komerca mondo malŝatas limojn" estis lia kerna eldiro. El tio sekvas pledo por komuna mono kaj komuna facila lingvo.

Jen citaĵo el "Esperanto aktuell", organo de GEA, n-ro 4/97, paĝo 1, pri la podia diskuto:

> Siegbert Alber konstatis, ke ne eblos egale trakti 15 of 20 lingvojn en unuiĝinta Eŭropo. "Tiam en kunveno de dek personoj necesus 20 aŭ pli da interpretistoj", li diris. Por eviti tion, necesos elekti "neutralan lingvon, ĉu mortan, ĉu artefaritan". Zlatko Tiŝljar substrekis la neceson elekti neŭtralan lingvon: En Soveta Unio oni volis krei sovetan identecon per komuna (neneŭtrala) rusa lingvo, sed la rezulto estis rusigo de duona kontinento; en Jugoslavio oni volis krei jugoslavan identecon, sed rezultis serbigo de duona Balkano. Ambaŭ modeloj fiaskis, sekve Eŭropo evitu akcepti la anglan aŭ iun ajn alian nacian lingvon kiel komunan lingvon, ne, la eŭropa identeco funkcios nur kun ĉiuj siaj etnaj lingvoj egalrajte unu apud la alia kun aldone neŭtrala komuna lingvo por ĉiu. Konsekvence, en la rezolucio la kongresanoj deklaris, ke "la lernado de (...) Esperanto, sekvata de laŭebla lernado de unu aŭ pluraj etnaj lingvoj, estas la plej taŭga vojo por atingi egalrajtan komunikadon kune kun pli profunda reciproka kono".

Kiel anoncite en La Merkato n-ro 56 de aprilo 1997, paĝo 3, sub cifero 7, IKEF planis organizi dum la kongreso en Stuttgart je sabato 17 majo informkunvenon. Tiu informkunveno okazis, sed bedaŭrinde pro manko de libera loko ĝi estis enprogramita jam frumatene je la 8.30 ĝis la 10.00 h., do ĵus antaŭ la solena inaŭguro de la kongreso. Tial, malgraŭ anonco en la kongresa libro, venis nur 11 personoj, la plej multaj kun konsiderinda malfruo, inter ili 6 IKEF-membroj kaj 5 interesitoj, i.a. d-ro Werner Bormann kaj s-ino Renée Triolle, vicprezidanto de UEA.

Franz Josef Braun, prezidanto de IKEF, prezentis la raportojn pri agado kaj la financan raporton por la jaro 1996 - kun denove plialtiĝinta membronombro - ambaŭ publikigitaj en La Merkato n-ro 56. Sekvis vigla diskutado pri celoj kaj fruktoplenaj agadoj de la fakgrupo. Oni samopiniis, ke entute la modernaj elektronikaj medioj (interreto - internet) pli kaj pli devas esti uzataj de la membroj kaj ke la ideoj kaj strategio iru pli en direkto de agadoj alportontaj monon en la kason de IKEF kaj de la Esperanto-movado.

FJB

**Elekto al la estraro**

Kiel anoncite en La Merkato n-ro 56 de aprilo 1997, paĝo 3, cifero 6,



pro ne-okazo de oficiala ĝenerala kunveno ĉi-jare, la elekto de membroj de la estraro okazas per skriba voĉdonado sendota al la adreso de la prezidanto ĝis 1997-06-30.

La estraranoj d-ro Gether, s-ro Gilbert, s-ro König, s-ro Rotsaert kaj s-ro Yamasaki, kies oficperiodo finiĝos en julio ĉi-jare, denove pretas kandidatiĝi. La aliaj du estraranoj, d-ro Picasso kaj s-ro Braun, proponis reelekton de ili.

Ĝis 1996-06-23 alvenis ĉe la prezidanto nur kvar voĉdonoj kun jena rezulto:

> Gether 4, Gilbert 4, König 3, Rotsaert 4, Yamasaki 4 voĉoj.

Neniu alia persono estis proponita kaj voĉdonita. Nia statuo ne preskribas minimuman kvanton da voĉoj po kandidato. Tio signifas - se ne alvenas pliaj voĉdonoj dum la lastaj tagoj de junio - ke la kvin kandidatoj kaj ĝisnunaj estraranoj estas reelektitaj. Koran gratulon al ili. Ilia nova oficperiodo daŭros ĝis julio 1999.

Franz Josef BRAUN, Prezidanto

**Sindikata Terminaro: reeldon(et)o**

Ĉar de tempo al tempo venas peto por aĉeti ekzempleron de la pasintjare eldonita kaj jam elvendita Sindikata Terminaro, estis kopiitaj kelkdekaj pliaj ekzempleroj. Krom kelkaj korektoj, ne estas ŝanĝoj en la nova eldono.

**Alvoko al niaj membroj por kunlaboro en la redaktado de La Merkato**

La Merkato estas la organo por nia interkomunikado. En ĝi la estraro prezentas administrajn kaj primembrajn informojn, estontajn Esperanto-aranĝojn iel rilatajn el komerco/ekonomio, kaj ĉiujare en la aprila numero la jarraporton pri la agado kaj la financan raporton pri la antaŭa jaro. Gravan parton en La Merkato konsistigas anoncetoj pri komercaj petoj kaj proponoj, kiujn ni eĉ senpage aperigas por anoncantoj el landoj laŭ UEA-kategorio B (malriĉaj landoj). Bedaŭrinde ni ne ricevas informojn de la anoncintoj pri sukceso de iliaj anoncetoj.

Alia grava parto de La Merkato estas rezervita por raportoj de niaj membroj pri iuj agadoj direkte al la celoj de nia fakgrupo. Estas grave ke la membraro ekscias pri tio: ĉiu povas lerni por sia propra

agado el la sukcesoj/malsukcesoj/spertoj de la raportinto. El tio povas ekesti nova agado de iu membro, kiu apogis sin sur aŭ konektas kun raportita agado de koleg(in)o. Plia avantaĝo estus, ke la estraro povas facile ĉerpi el la raportoj por sia oficiala jarraporto; alimaniere kelkaj gravaj agadoj ne estas konigitaj al la estraro kaj iel mankos en la jarraporto.

Do, estimataj gekolegoj, per tio mi celas instigi vin, ke vi pli konscience ol ĝis nun sendu raporton pri agado via - ĉu sukcesa aŭ ne - al la redaktoro, Roland Rotsaert. Per tio vi helpis lin ankaŭ en la redaktado de nia komunikilo.

FJB

**Internacia TradukReto pere de Esperanto (ITRE)**

En aprilo aperis la tria eldono de la ITRE-adresaro. La broŝuro enhavas detalajn informojn pri tradukistoj. Krome enestas laŭlingva listo (indekso), tarifoj kaj pagoj, interna regularo kaj ĝeneralaj informoj pri ITRE. La adresaro kostas 30 francajn frankojn kaj estas mendebla ĉe Daniel Durand, Les Nids, F-49190 Sr.AUBIN-DE-LUIGNE, Francio (kontoj itre-g ĉe UEA kaj FEL, franca pĝk. Nantes 6259 97 R).

**Novaj membroj**

241. S-ro Peter OPA - Opa Farms Ltd, P.O. Box 250, AJARA BADAGRY, LAGOS STATE, Niĝerio; reto: p.a. elna(a)netcom.com
242. S-ro Mário FONSECA - Fonseca Kursos & Traduçoes Ltda, SQN 312 - Bl C - Apt° 210, BR-70 765-030 BRASILIA - DF, Brazilo; telefono +5561-2744029, fakso +5561-2232076, reto philips(a)nettur.com.br
243. S-ro Aleksandâr ZAĤARIEV, str. K.T. Noĉev 1, ap. 20, BG-1407 SOFIA, Bulgario
244. S-ro Jean-Jacques BIMONT - FRANCE BIEN-ETRE, BP 155 22, rue d'Amiens, F-60281 MARGNY-LES-COMPIEGNES Cedex, Francio; telefono 03.44.83.27.80, fakso 03.44.83.37.05

**Novaj (ret)adresoj**

3. S-ro Roland ROTSAERT: nova retadreso: <rotsaert(a)agoranet.be>
148. S-ro Yvon POUPEAU, Res. de la Talonnerie n° 7, 51 Chemin de la Talonnerie, F-77000 VAUX LE PENIL
237. S-ro James ZHENG, 6-101, No. 293 Panyu Road, CN-200052 SHANGHAI, telefono 00-86-21-62817354, fakso 62814384, reto first(a)npc.haplink.co.cn.

**Komercaj petoj kaj proponoj**

**Ĉinio**



Fushun N-ro 1 Petrolrafinejo ĉiujare produktas pli ol cent mil tunojn da parafina vakso (marko Yuan Hang), vendata en pli ol 50 landoj. Ĝi ankaŭ ofertas specialajn vaksaĵojn (ekz. por kaŭcuko, papero, lanĉo de ŝipo, tekstilo, lignoprilaborado, plumado ktp). Petu informojn (angle aŭ esperante) de: Wu Guojiang (IKEF 219), Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 FUSHUN, LIAONING; fakso +86-0413-2332207.

**Danio**

Desegnanto de komputilaj ludoj serĉas vendantojn, precipe en EU. Jacob NORDFALK, Redmandsgade 53 - 2th, DK-2200 KOPENHAGO N, rete nordfalk(a)alf.nbi.dk.

**Francio**

Mi verkas programojn por (IBM-kongruaj) komputiloj por fari sciencajn mezurojn: oni konektas mezurilojn aŭ sensilojn al komputilo, kaj miaj programoj registras mezurojn, kalkulas, kaj grafike prezentas tiujn mezurojn. Iuj estas senpagaj, aliaj pagendaj; ĝis nun nur franclingvaj. Mi serĉas samfakulojn.
Pierre DIEUMEGARD, 8 montée des Marguerites prolongée, F-13117 LAVERA; rete pierdieum(a)aix.pacwan.net.

**Zambio/Zairio**

S-ro MULUNGULA MUBEKA Jules, c/o Chikolongo, P.O.Box 37802, LUSAKA 10101, Zambia, rifuĝinto el orienta Zairio, tra s-ro Hans BAKKER (NL) sendis jenan peton:

> Mi volus havi adresojn de grandaj firmaoj de Internacia Komerco tra kiuj oni povas sciiĝi pri la bona vojo havi komercan katalogon entenantan sekretajn prezojn de varoj. Se vi posedas informojn pri tio, bonvolu sendi al ni.

Ĉu iu IKEF-ano kapablas helpi ? RR

----------------------------------------------------------------

**Identecŝildo**

Nomo: s-ro Jean-Jacques BIMONT Membronumero: 244

Profesio: estro de persona firmao Naskiĝjaro: 1946

Nomo de la firmao: France Bien-Etre

Adreso: BP 155 22, rue d'Amiens, F-68281 MARGNY-LES-COMPIEGNES Cedex, Francio

Telekomunikado: telefono 03.44.83.27.80 fakso 03.44.83.37.05

Proponataj servoj: vendo per poŝtsendado de dietaj produktoj; disvastigota al komputilaĵoj (ekz. CD-ROM).

Lingvaj kapabloj: angla (sufiĉe bone), esperanta (tre bone)

**Be successfull in your Business relations with the West**
(Havu sukcesajn komercajn rilatojn kun Okcidento)

**Tradukprojekto por IKEF ?**

TACIS estas projekto de la Eŭropa Unio celanta disvolviĝon de la ŝtatoj de la eksa Soveta Unio kaj Mongolio. Tiucele ĝi disponigas subvenciojn (2,3 miliardojn da ekuoj en la periodo 1991-95) por helpi en la transiro al merkato ekonomio. Tio i.a. okazas per trejnado kaj eldono de kelkdekaj klerigaj broŝuroj (en papera aŭ elektronika formo). "Be successfull..." (ISBN 92-827-8677-3, A4-formato, 44 p.) estas unu el tiuj broŝuroj.

Tuj kiam mi ekvidis la broŝuron, mi pensis ke utilus traduki ĝin esperanten. Ĝi priskribas la metodojn kiujn firmao uzu por akiri informojn pri la eksterlanda partnero okaze de farota kontrakto. La konsiloj estas utilaj (kvankam foje nur teorie realigeblaj), sed mi dubas ĉu en la nuna formo ili atingas la celpublikon, nome komercistojn el eksa SU komencantajn internaciajn transakciojn. (Cetere, la broŝuro same bone taŭgus por aliaj mondpartoj.) La broŝuro estas relative multekosta (mi pagis, en Belgio, egalvaloron de ĉ. 17 DEM - eble por kursanoj ĝi estas senpaga), estas iom komplike por akiri ĝin, kaj, plej grave, laŭ mi (regula aŭskultanto kaj leganto de angla lingvo) ĝi estas nefacile komprenebla por personoj kies gepatra lingvo ne estas la angla. Laŭdire ekzistas ankaŭ rusa versio, sed eble la rusa por la juna generacio en eksa SU estas same problemiga.

La broŝuron verkis la britaj konsilistaj firmaoj Sinclair Roche & Temperley kaj Ernst & Young. Tio ne nur klarigas la lingvo-uzon, sed ankaŭ la regulaj sugestoj peti helpon de 'specialistojn' por fari esplorojn...

Malgraŭ la menciitaj malpli bonaj aspektoj de la broŝuro, restas mia konvinko ke ĝi meritas tradukon al Esperanto. Nur IKEF kapablas realigi tion, sed estos peza tasko: pli ol 40 grandformataj paĝoj kun ofte komplikaj tekstoj. IKEF havas la rimedojn por eldoni kaj senpage aŭ malmultekoste distribui ĝin en simpla formo. Profesia



eldono nur eblas kun subvenciado. Kompreneble, krom takso de la realigebleco nepre necesas la konsento de la Eŭropa Unio.

Roland ROTSAERT

Kelkaj adresoj (transprenitaj el la broŝuro):
- Tacis Information Service, AN 88/1/06, Wetstraat 200, B-1049 Bruselo (fakso +32-2-231.04.41)
- Tacis Co-ordination Unit, Government House, Room 114, 220010 MINSK (tel. 27.32.39)
- Tacis Co-ordination Unit, National Development Board of Mongolia, Room 408, Negdsen Understnii Street, 46 Ulaanbaatar, tel. 31.10.13
- Delegation of the European Commission, 2/10 Pevchesky Pereulok, 109208 Moscow, tel. 956.36.00
- Delegation of the European Commission, 10 Ul. Kruglouniversitska, 252024 Kiev, tel. 293.14.83
- Tacis Co-ordination Unit, 4 Tarasa Chevchenko Street, 700029 Tashkent